

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII, SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

Dr. STAN. KAMARYT:

ALBERT ŜKARVAN, LA UNUA SLOVAKA PIONIRO DE ESPERANTO.

Okaze de apero de la slovaka esperanto-ŝlosilo ni sentas nin devigataj rememori la slovakon pioniron de la lingvo internacia publikigante lian biografion, ĝenerale nekonatan al niaj samideanoj.

MUDr. Albert Ŝkarvan naskiĝis la 31-an de januaro 1869 en Tvrdoŝin en nuna Slovakio, tiam „supera lando Hungaria“. Gimnazion li finis en Kežmarok, medicinon studis en Praha, Budapeŝt kaj Innsbruck, kie li akiris doktoran diplomon pri medicino. Jam tiam li estis plene kaptita de instruo de Tolstoj, fariĝis lia senkompromisa disĉiplo kaj en fino de sia militservo, kiel soldata kuracisto, li rifuzis militservi kaj proklamis tion per publika letero datumita la 6-an de novembro 1895 kaj sendita al L. N. Tolstoj. Lia majstro enmetis ĝin en sian verkon „Ciklo de legajoj“. Ŝkarvan diras en tiu letero: „Mi estas kristano, kaj tial mi nek per vorto nek per faro povas esti helpanto de militistaro. Ĝis nun mi ne faris tiel, ĉar mi ne havis sufiĉon da anima forto por kontraŭstari tian gravan potencion, kia estas la militista organizo. Sed nun mia konvinko firmiĝis, kaj tio ne okazis verŝajne per influo de ia patosa humoro, sed kiel konsekvenca rezultato de miaj meditadoj kaj penado dum kelkaj jaroj.“

La hungariaj aŭtoritatoj senigis lin pro tio de la doktora diplomo kaj de la oficira grado kaj li iris Rusujon al sia majstro, kie li travivis iom pli ol unu jaron, parte en Jasnaja Poljana, parte kun Ĉertkov kaj en aliaj lokoj. En la jaro 1896 devigate forlasi Rusujon li vojaĝis kun Ĉertkov Britujon; li tie tre malŝanĝiĝis, kaj estis zorge flegata de la Ĉertkova

familio. Resaniĝinte li migris Svislandon, kie li poste vivis dum dek jaroj ofte ŝanĝante la urbojn, ĉar li pro nekompromisa aplikado de la anarkismaj teorioj venadis en konfliktojn kun la tieaj aŭtoritatoj. Tie li ankaŭ la unuan fojon edziĝis, kun Italino; havis kun ŝi du filojn, sed la edzino mortis antaŭ lia reveno la patrujon.

Dum sia loĝado en Svislando li serioze ekinteresis pri esperanto kaj tradukis slovakon, helpate de tiam tre konata kaj vigla rusa esperantisto N. P. Evtifejev, la Fundamenton kaj eldonis ĝin verŝajne kun financa helpo de sia kunlaboranto en Turĉianský Sv. Martin (Slovakio) en jaro 1907. La titolo de la libro estas:

ESPERANTO-VERKARO DE DRO ZAMENHOF. ZÁKLADY MEDZINÁRODNEJ REĈI ESPERANTO

od Dra Zamenhofa.

Zhotovill a vydali N. P. Evtifejev a A. Ŝkarvan

Úplný slovenský preklad.

Cena Kĉ 1.50.

Turĉianský Sv. Martin.

V komissii u Knihotáĉarského úĉast. spolku
v Turĉianskom Sv. Martine,
1907.

La libro enhavas 112 paĝojn + 16^a paĝojn de korektaĵoj (13x20 cm). La lasta kovrila paĝo estas plene dediĉita al anonco de la ĉeĥaj propagandaj esper. eldonaĵoj de Th. Ĉejka, sur la lasta teksta paĝo estas anoncoj pri la tiama ĉeĥa gazeto „Naše Slovensko“ (Nia Slovakujo) kaj ankaŭ ĉeĥa anonco pri la broŝuro „Slovakoj kaj Magiaroj“ de H. K. Bouška, aperinta en 1907. Post la titolpaĝo sekvas paĝo dediĉita en slovaka lingvo: „Dediĉas al Nacio slovaka. Eldonant-

oj.“ Ŝkarvan loĝis tiam en Svislando en Gd Lancy, kaj oni legas laŭ tiama kutimo, ke la interesantoj pri esperanto turnu sin al la aŭtoro laŭ la donita adreso.

Post deko da jaroj (1918) Ŝkarvan aperigis novan eldonon de la lernolibro en Chicago. Kiom estis vendata la amerika eldono oni ne scias, la enlanda eldono versimile ne tro, ĉar ankoraŭ en la jaro 1926 fervora esperantisto Jozef Popper el Ĉadca povis aĉeti en la presejo en Turčianský Sv. Martin la restintajn 900 ekzemplerojn. Li volis disvendadi kaj disdonadi ilin por propagandaj celoj. Sed ĉar li baldaŭ poste (en 1927) mortis, restis tiu provizo, verŝajne preskaŭ tuta, neuzita kaj nun kuŝas en loko nekonata.

En la jaro 1909 Ŝkarvan revenis sian patrujon kaj ricevinte permeson denove praktiki sian kuracistan profesion, li vivis sinsekve kiel privata, poste ankaŭ kiel distrikta kuracisto en Dolné Tery kaj Bátovce. Dum la mondmilito li estis diversmaniere ĉikanata de la Hungariaj policaj kaj militaj aŭtoritatoj, ĉar oni suspektis lin pro amikaj sentoj al Rusujo. Li estis (la 11. III. 1915) arestita en soldatan arestejon en Bratislava, la militserva tribunalo lin liberigis, sed la sekvintan jaron li ricevis dekreton pri internigo en Jager kaj poste en Verpelét, kaj la 7. VIII. 1916 li estis per dekreto de la disciplina komisiono senigita de sia ofico pro „nepatriota kaj kontraŭ unueco de la nacio tendencanta panslavisma konduto.“ Kiel pruvo de tiu ĉi konduto estas en la komisiona dekreto inter aliaj faktoj konstatite, ke Ŝkarvan ricevis laŭ enskriboj de la poŝto en jaroj 1912—1914 centdudek kvar (124) rekomenditajn sendaĵojn el Rusujo kaj 107 korespondaĵojn el Odesa. Ĉu oni ne povas konjekti, ke almenaŭ plejparto de tiuj korespondaĵoj estis esperantaĵoj?

Post la ŝtata renverso Ŝkarvan venis Slovakion kaj ricevis laŭ sia peto postenon de distrikta kuracisto en Liptovský Hrádok, kiun li preferis spite ĝia malgrandeco (475 loĝantoj), ĉar ĝi estis en ĝia naskiĝregiono. Sed en la liberan patrujon revenis jam viro kun ekrompitaj fortoj. Reveninte el Svislando vidva kun 2 filoj, li edziĝis la duan fojon, kun Slovakino el tre ŝatata familio, kaj ŝajnis ke ĝojo pri nova vivo envenis lian koron.

Tiam li ankaŭ publikigis sian plej grandan verkon: „Notlibreto de la militserva kuracisto“ (Zápisky vojenského lekára), kiun eldonis Aventinum en Praha. Sed la kuracista profesio elĉerpadis lin tro kaj lia anemio relative baldaŭ pligravigadis. Li kuracadis sin en

Smokovec en Tatra-montaro, sed la pliboniĝoj de lia korpa stato ne estis daŭraj kaj li fine mortis la 29-an de marto 1926.

La ĉeĥoslovakaj esperantistoj danke rememoru la grandkoran homon, kiu semis en teron virgan!

KAREL CAPEK:

STELITA KAKTO.

Al S-ro Hans Jakob dediĉas la tradukinto.

„Mi do rakontos al vi,“ diris sinjoro Kubát, „kio okazis al mi la nunjaran someron.

„Mi estis en somerloĝejo, tia kiaj la somerloĝejoj estas: sen akvo, sen arbaro, sen fiŝoj, entute sen io ajn; sed, kompanse, estas tie forte reprezentata la popola partio, naturamika socio kun vigla sekretario, perlamota industrio kaj poŝta oficejo kun maljuna grandnaza poŝtestrino; mallonge, ĝi estas tiel, kiel ĉie aliloke. Kiam do proksimume dek kvar tagojn mi min tie donis al la feliĉgaj kaj higienaj efikoj de la enuo per nenio rompata, mi komencis flari, ke la lokaj klaĉistinoj kaj entute la publika opinio iel tro sin okupas pri mi. Kaj ĉar miaj leteroj venadis al mi suspektige bone glufemitaj, ke la dorso de la koverto eĉ brilis pro araba gumo, mi diris al mi: Jen, iu malfermas miajn poŝtaĵojn; tondro al tiu poŝtestra maljunulino! Vi komprenas, la poŝtistoj scias laŭdire malglui ĉiun koverton. Atendu, mi diris al mi; kaj jam mi sidis kaj per mia plej eleganta skribo mi komencis skribi: Ci timigulo poŝtestrina, ci grandnazulino, ci kometo, ci klaĉulino scivola, ci vipero, ci maljuna raspilo, ci sorĉistino, kaj tiel plu, kun plena respekto Jan Kubát. Aŭskultu, la ĉeĥa lingvo estas riĉa kaj preciza lingvo; per unu spiro mi elŝutis sur la paperon tridekkvar esprimojn, kiujn sincera kaj honesta viro povas uzi kontraŭ ĉiu sinjorino, ne fariĝante persona nek truda; poste mi kontente glufermis tion, skribis la propran adreson sur la koverton, kaj veturis en la plej proksiman urbon por enpoŝtigi tion. La sekvintan tagon mi rapidas al la poŝto kaj kun la plej agrabla rideto ŝovas la kapon en la ĝiĉeton. Sinjorino poŝtestro, mi diras, ĉu estas ĉi tie iu letero

por mi? — Mi vin akuzos, vi sentaŭgulo, ekfuriozis al mi sinjorino poŝtestrino kun la plej terura rigardo, kiun mi iam vidis. — Sed sinjorino poŝtestrino, mi diras al ŝi komplete, ĉu vi eble legis ion malagrablan? — Kaj poste mi preferis forvojaĝi.“

„Ĝestas nenio,“ diris kritike sinjoro Holan, ĉetĝardenisto de la Holbenĝardeno. „Tiu ĉi ruzo estis tro simpla. Mi povus rakonti al vi, kiel mi preparis kaptilon por ŝtelisto de kakttoj. Vi scias, sinjoro Holben estas granda kakttisto, kaj lia kolekto da kakttoj, sen mensogi, povas havi valoron de tricent miloj, se mi ne kalkulas la unikaĵojn. Estas pasio de la maljuna sinjoro, ke la kolekto estu alirebla al la publiko. Holan, li diras, tio estas nobla amuzo, tion oni devas vivteni en la homoj. Sed miavice mi pensas, se iu malgranda kakttisto vidas, ni diru, tian oran Gruson por dekdu centoj, tiam nur senhelpe lin doloras la koro, pro tio ke li ne havas ĝin. Sed se la maljuna sinjoro tion volas, nu bone. Sed iam en la pasinta jaro ni komencis rimarki, ke kakttoj perdiĝas al ni; kaj eĉ ne iuj el la belaj por okulo, kiujn volas ĉiu havi, sed ĝuste la specialaĵoj; jen ĝi estis Echinocactus Wislizenii, jen Graesnerii, poste iu Wittia, importita direkte el Kostariko, poste iu species nova, sendita de Friĉ, plie unu Melocactus Leopoldii, unikaĵo, kiun neniu vidis en Eŭropo jam pli ol kvindek jarojn, kaj fine Pilocereus fimbriatus el San Domingo, la unua ekzemplero, kiu iam venis en Eŭropon. Tiu ŝtelisto certe estis fakulo! — Vi ne havas ideon, kiel la maljuna sinjoro furiozis. Sinjoro Holben, mi diras al li, simple fermu viajn florvitrejojn, kaj estos fino. — Ne tion, kriis la maljuna sinjoro, tia nobla amuzo estas por ĉiuj; vi devos kapti al mi la malbonulon ŝtelistan; elĵetu la ĝardistojn, dungu novajn, alarmu la policon, kaj similajn aranĝojn. Tio estas malfacila afero; kiam ni havas tridekses mil potetojn, ni ne povas starigi apud ĉiu unu ĝardiston. Tiel mi almenaŭ dungis du distrikto-inspektorojn policajn en pensio, por ke ili gardu; kaj ĝuste tiam perdiĝis la Pilocereus fimbriatus kaj al ni restis nur rondkaveto en la sablo. Tio ja ege ekkole-

PR. VAICAITIS:

KIE KABAN' MUSKIGINTA?

Nask' kabano musk' kovrita,

Kie estas ĝi?

Kaj pomujo verdiĝanta,

Kiun vidis mi?

Kie revoj ĝajaj, junaj,

Kiel papili'

Kaj torentoj rapidflujaj,

Ĉarma idili'?

La kabano jam putriĝis:

Arbo estas for,

Riveretoj jam sekiĝis — —

Nur ĉagren' en kor'...

El la litova tr. A. Paškevičius.

rigis min kaj mi mem komencis persekuti la ŝteliston de kakttoj.

„Vi devas scii, la veraj kakttistoj, tio estas io kvazaŭ sekto de derviŝoj; mi pensas, ke anstataŭ la barbo kreskas al ili dornoj kaj pintoj, tiom pasiaj en tio ili estas. Ce ni ekzistas du tiaj sektoj: Klubo de kakttistoj kaj Societo de kakttistoj; kia estas diferenco inter ili, mi ne scias, — mi pensas, ke la unuj kredas, ke la kakttoj havas senmortan animon, dum la aliaj alportas al ili sangoferojn; sed, mallonge, la ambaŭ sektoj reciproke sin malamas kaj persekutas sin per fajro kaj glavo sur la tero kaj en la aero. Mi do vizitis la prezidantojn de la du sektoj kaj tute konfidence demandis ilin, ĉu ili havas iun ŝajnon, kiu povus — eble el la alia sekto — esti la ŝtelisto de la kakttoj de Holben. Kiam mi diris al ili, kiuj el niaj neordinaraj kakttoj perdiĝis, ili deklaris kun plena certeco, ke do ne povis ilin ŝteli iu ano de la malamika sekto, ĉar tie estas sole fuŝistoj, mallertuloj kaj ignorantoj, kiuj ne havas ideon, kio estas tia Wislizen aŭ Graessner, ne parolante pri Pilocereus fimbriatus; kaj rilate iliajn proprajn membrojn, ili garantias por ilia honesteco kaj nobleco; ili ne estas kapablaj ŝteli ion, escepte ja iun kaktton; sed se iu el ili tian Wislizen havus, li ĝin certe montrus al la aliaj por adorado kaj religiaj orgioj, sed pri tio ili, la prezidantoj, nenion scias. Post kio am-

baŭ honorindaj sinjoroj diris al mi, ke krom la du publike rekonitaj aŭ tolerataj sektoj ekzistas ankoraŭ sovaĝaj kaktistoj kaj tiuj, diris ili, estas el ĉiuj la plej malbonaj; ili estas tiuj, kiuj pro sia pasiego ne povas akomodiĝi al la pli moderaj sektoj aŭ kiuj ĝenerale emas al diversaj herezoj kaj perfortoj. Kaj tiuj ĉi sovaĝaj kaktistoj estas kapablaj je ĉio.

Kiam mi do ne sukcesis ĉe la du sinjoroj, mi suprenrampis sur belan aceron en nia parko kaj meditis. Mi diras al vi, plej bone oni meditas en branĉaro de arbo; tie la homo estas iel apartigita, iom balancata kaj dum tio li ĉion rigardas el pli alta vidpunkto; mi pensas, ke la filozofoj devus vivi sur arboj kiel oriolo. Kaj sur tiu acero mi elpensis planon. Unue mi vizitis sinsekve miajn konatajn ĝardenistojn kaj diris: Kamaradoj, ĉu ne putras al vi iuj el la kaktoj? La maljuna sinjoro Holben bezonus ilin por siaj eksperimentoj. — Tiamaniere mi havigis al mi kelkcentojn da malsanaj kaktaj en unu nokto mi enŝovis ilin inter la kaktaron de Holben. Du tagojn mi silentis, kaj la trian tagon mi metis en ĉiujn ĵurnalojn la jenan informon:

La mondkonataj kolektoj de Holben en danĝero!

Kiel ni sciigas, la granda parto de la unikaj florigoj de Holben estis atakita de nova kaj ĝis nun nekonata malsano, enportita plej verŝajne el Bolivio. La malsano atakas precipe la kaktajn, daŭras iun tempon latente kaj fine vidiĝas kiel putrado de radikoj, kolo kaj korpo. Ĉar ŝajnas, ke tiu ĉi malsano estas tre infekta, kaj ke ĝi rapide disvastiĝas per ĝis nun nedifinitaj mikrosporoj, la kolektoj de Holben estis fermitaj.

Proksimume post dek tagoj — dum tiuj dek tagoj ni devis resti kaŝitaj, por ke la kaktistoj ne disŝiru nin per amasaj demandoj — mi sendis al la gazetoj duan informon:

Ĉu oni sukcesos savi la kolektojn de Holben?

Kiel ni sciigas, profesoro Mackenzie en Kew difinis la malsanon, kiu aperis en la mondfamaj Holben-kolektoj, kiel specialan tropan ŝimon (Malacorrhiza paraguayensis Wild.) kaj rekomendis surŝpruci la atakitajn ekzemplerojn per tinkturo de Harvard-Lotsen. La ĝisnunaj eksperimentoj kun tiu ĉi kuracilo, kiuj nun grandmezure estas farataj en Holben-kolektoj, estas tre sukcesaj. La solvaĵo de Harvard-Lotsen estas aĉetebla ankaŭ en nia urbo en tiu kaj tiu magazeno.

„Kiam tio ĉi aperis, sidis jam unu detektivo en tiu magazeno kaj min mi lokis apud la telefono. Post du horoj telefonis al mi la detektivo: Do sinjoro Holan, ni lin jam havas ĉi tie. — Post dek minutoj mi tenis je la kolumo malgrandan hometon kaj skuigis lin.

„Sed sinjoro, protestis tiu hometo, kial vi min skuigas? Mi ja venis ĉi tien nur por aĉeti la konatan tinkturon de Harvard-Lotsen. —

„Mi scias, diras mi al li, sed io tia ne ekzistas, same ne iu nova malsano; sed vi venadis ŝteli kaktajn en la kolektojn de Holben, vi malbenita fripono!

„Dio estu dankata, elbalbutis la hometo, tia malsano do ne ekzistas? Kaj mi dek noktojn ne dormis pro la timo, ke per ĝi infektiĝos miaj ceteraj kaktaj!

„Je la kolumo mi do elportis lin en la aŭton kaj veturis kun li kaj kun la detektivo en lian loĝejon. Aŭskultu, tian kolekton mi ankoraŭ ne vidis; tiu hometo havis unu ĉambreton mansardan en Vysočany, nu, proksimume trioble kvar metrojn, en angulo sur planko litkovrilon, tableton kaj seĝon, kaj ĉio cetera estis sole kaktaj; sed kiaj ekzempleroj kaj en kia ordo! neniam vi trovos ion similan.

„Kiujn pecojn li do ŝtelis al vi, diras la detektivo; kaj mi rigardis tiun friponon, kiel li tremas kaj glutas la larmojn. Aŭdu, mi diris al la detektivo, ĝi ne havas tian valoron, kiel ni opiniis; diru en la direkcio, ke ĝi havas valoron de kvindek kronoj kaj ke mi mem aranĝos tion kun la sinjoro.

„Kiam la detektivo foriris, mi diras: Do, amiketo, unue kunpaku al mi ĉion, kion vi forportis de ni. — La hometo palpebrumis, ĉar li estis eklarmonta, kaj flustras: Mi petas vin, sinjoro, ĉu mi ne povus prefere pune sidi pro tio?

„Ne, mi krias al li, unue vi devas redoni, kion vi ŝtelis al ni. — Li do komencis elprenadi unu poteton post alia kaj metis ilin flanken; ili estis proksimume okdek — ni ne havis ideon pri tio, ke tiom mankis al ni; sed verŝajne li ŝteladis tion jam dum multaj jaroj. Tamen, por certiĝi, mi ekkriis al li? Kion, tio ĉi estas ĉio?

„Tiam larmoj elsaltis al li; li elprenis

Ekzistas esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en la ĉiutlandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj oni ne aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos tre mizeran rezulton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon. Praktike ĝi estas senutila, krom al la kleruloj sin okupantaj pri filologio, al la katolikaj pastroj kaj . . . al la profesoroj de latina lingvo. Ĉar la lernintoj ne havas la okazon ĝin uzi, ili forgesas ĝin kelkan tempon post la eliro el la gimnazio. Certe, la latina lingvo estas multe pli malfacila ol Esperanto, sed oni aliparte dediĉas al ĝia studado multe pli da tempo. En la mezepoko la latina lingvo ne estis pli facila ol nun; tamen preskaŭ ĉiuj intelektuloj uzis ĝin, skribis en ĝi siajn verkojn, parolis ĝin. Nuntempe oni ĝin instruas al pli multaj homoj ol antaŭe, sed ĝi estas multe malpli utila. Tio montras, ke ne sufiĉas instrui lingvon en la lernejoj, por ke ĝi estu vivanta lingvo, praktike uzata . . .

Hector Hodler, 1919.

ankoraŭ unu blanketan De Laitii kaj unu corniger'on, metis ilin al la aliaj kaj singulte diris: Sinjoro, je mia animo, pli da viaj mi ne plu havas.

„Tio montriĝos ankoraŭ, fonderis mi, sed nun ankoraŭ diru al mi, kiel vi povis ilin forportadi de ni.

„Estis jene, li balbutis kaj dum tio tiel saltis lia gorĝnodo pro ekscito. Mi.. mi nome surprenis tiun veston...

„Kiun veston? krias mi. Tiam li rugiĝis pro ega embaraso kaj balbutis: Virinan veston, mi petas.

„Hometo, mi miras, kaj kial ĝuste la virinan veston?

Ĉar, ĝeme li diris, mi petas, tian nejunan virinon neniu atentis, kaj plie —

li aldonis preskaŭ venke — la prudento diras al vi, ke pri io tia neniu suspekto virinon! Sinjoro, la virinoj havas ĉiujn eblajn pasiojn, sed neniam ili faras kolektojn! Ĉu vi jam vidis virinon, kiu havas kolekton da poŝtmarkoj aŭ da skaraboj, aŭ inkunabloj aŭ similaj aĵoj? Neniam, sinjoro! La virinoj ne havas la ĝisfundemon kaj—kaj la manion. La virinoj estas tiel ege senentuziasmaj, sinjoro! Vidu, tio estas la plej granda diferenco inter ni kaj ili; ke sole ni faras kolektojn. Mi iel pensas, ke la universo estas sola kolekto da steloj; ekzistas ia vira Dio kaj tiu faras al si kolekton da mondoj; tial ili estas tiel ege multaj. Hergot, se mi havus tiom da loko kaj rimedoj kiel li! Ĉu vi scias, ke mi elpensas al mi novajn kaktajn? Kaj nokte mi sonĝas pri ili; ekzemple tia kaktaj, kiu havas orkolorajn harojn kaj ĝenciane blujn florojn — mi ĝin nomis *Cephalocereus nympha aurea Racek* — jes, mia nomo estas Ráček, bonvolu scii; aŭ *Mamillaria colubrina Racek*; aŭ *Astrophytum caespitosum Racek*; sinjoro, tie ĉi estas mirakla eblecoj! Se vi scius —

Atendu, mi interrompis lin; kaj en kio vi forportadis la kaktajn?

„Mi petas, sur la brusto, li diris honteme. Ĝi tiel bele pikas.

„Aŭskultu, mi ne plu havis la koron por povi al li la kaktajn preni. Ĉu vi scias, kion ni faru, mi diris al li, mi veturos kun vi al la maljuna sinjoro Holben, kaj tiu jam forŝiros al vi la ambaŭ orelojn. — Homoj, tio estis io, kiam la du interkompreniĝis! Dum la tuta nokto ili restis en la florvitrojo ĝis ili preteriris la tridekses milojn da potetoj. Holan, diris al mi la maljuna sinjoro, tio estas la unua homo, kiu komprenas valoron de la kaktaj. Kaj antaŭ ol pasis monato, la maljuna sinjoro Holben kun ploro kaj benado ekpisis tiun Ráček al Meksikio, por ke li tie kolektu kaktajn; ili ambaŭ kredis sanktosankte, ke tie kreskas ie *Cephalocereus nympha aurea Racek*. Antaŭ forpaso de unu jaro ni ricevis strangan informon, ke sinjoro Ráček tie finis en bela kaj martira morto. Li trovis tie ĉe iuj Indianoj ilian sanktan kaktajn Ĉikulí, kiu estas, vi devas tion scii, la propra frato de Dio la Patro, kaj li

aŭ ne riverencis ĝin aŭ eĉ ŝtelis ĝin; mallonge, la amindaj Indianoj ligis sinjoron Ráček kaj sidigis lin sur Echinocactus visnaga Hooker, kiu estas granda kiel elefanto kaj surkreskita de dornoj longaj kiel rusaj bajonetoj, sekve de kio nia samlandano, sin doninte al sia sorto, elspiris la animon. Kaj tio do estas fino de la ŝtelisto de kakttoj.

El la ĉefo: Rud. Hromada.

Poeto kaj naturscienco. Ne estas aĉeraĵo tute neordinara, ke la poeto konscie, sed pli ofte senkonscie, rakontas pri aferoj, kiuj incitetas la veran naturscienciston. Diversaj fabeloj kaj legendoj, kreitaj de poetoj el ilia tro riĉa fantazio, transiris en la popolon kaj tie ili persiste vivas, eĉ kontraŭ la scienca vero. Tia bestefo, kies famon difektis poeta verko, estas la cikado. La poeto Lafontaine en sia konata fabelo „Cikado kaj formiko“ parolas pri la cikado kiel ekstrakto de ĉia mallaboremo; la cikado venas vintre al bona kaj diligenta formiko por almozricevi fomo da nutraĵo. La formiko, kompreneble, demandas, kion la cikado faris dum la somero. „Mi kantis“ diras la cikado. „Nun dancu do“, rifuzas ĝin la formiko. La poemo certe havas poetan kaj didaktan valorojn — ĝi ofte estas en lernolibroj de la franca lingvo, ankaŭ en esperanto-legolibroj ĝi troviĝas — sed natursciencie ĝi estas vere monstra. Lafontaine apenaŭ iam aŭdis la kanton de cikadoj kaj verŝajne eĉ ne sciis, ke la cikadoj vintre ne vaĝas en la naturo. Kaj la cikado certe ne irus peti la formikon pri iom da greno, kiun ĝia delikata suĉorgano ne povus uzi. La cikadoj nutras sin sole per vegetalaj suktoj, kiujn la matura kaj sekiĝinta greno tute ne enhavas. (a. d.)

Ĉeĥoslovaka ĝejsero en Herlany (Slovakio). En la mezo de la baseno elstaras larĝa tubo. Subite ĝi pleniĝas per akvo, tiu komencas elflui kaj subite elpuŝiĝas el ĝi fluo de fluidaĵo unu metron alta. La fluidaĵo estas blanka kaj densa kiel kremo, ĝi leviĝas kaj malleviĝas kaj disfalas kun ŝaŭma bruo. Kaj subite, kiam ŝajnas, ke la fonto jam tute falis, ĝi elpafiĝas ĝis alteco de 15 m, kaj ankoraŭ pli alten, kaj ankoraŭ pli... Proksimume tridek metrojn alte aŭ eĉ pli supreniras nun la potenca kolono de la blanka akvo, super la branĉarojn de la ĉirkaŭaj tiloj kaj super la pintojn de la altaj popoloj, muĝante kaj ŝaŭmante la misteran kanton de subteraj potencoj. Dudek kvin minutojn

daŭras la spektaklo kaj okcent hektolitroj da akvo odoranta per hidrosulfido*) elfluas en basenojn de la banĉambroj. — Malofte vidaĵo, potence impresanta, al kiu similan vi ne trovas en la tuta Eŭropo, escepte Islandon. Se tiun ĉi admirindaĵon havus en la manoj lerta entreprenisto, miloj da homoj venadus ĉi tien por vidi — dum nun rigardas ĝin ok aĝaj homoj kaj kvar buboj.

(Karel Scheinpflug, L. N. 6. X. 29.)

Epoko de la civilizo kaj homa vivo. Komparon inter la civiliza epoko de la homaro kaj unu homa vivlongo prezentas J. H. Robinson en la verko „Intelektu en la aktiva evoluo“, kies ĉefan tradukon eldonis la kooperativa Družstevní práce. Por atingi la nunan gradon de la civilizo, la homaro bezonis ĉirkaŭ duonon da miliono da jaroj; por komparo ni metas tion apud la vivdaŭron de homa individuo, kalkulatan je 50 jaroj. Tiam dek miloj da jaroj de la homa ĝento egalus al nia unu jaro. Rezonante laŭ tiu ĉi mezurilo, oni bezonis 49 jarojn sole por tio, ke el pratempaj krudaj ĉasistoj fariĝu terkulturantoj per tio, ke ili tie ĉi kaj tie restis sidi, komencis kulturi la teron kaj konservi la rikoltojn, malsovaĝigi la bestojn, kaj teksti siajn krudajn vestojn. — Post plia jarduono iu el ili, dum kondiĉoj speciale favoraj, elfrovis la skribarton. — Proksimume tri monatoj estas bezonataj por elkulturi la literaturon, arton kaj filozofion, kaj per tio estis samtempe decidite pri la evoluo de kelkaj pluaĵ semajnoj. — Nur du monatojn la homaro ĝuas la benon de la kristanismo. — La prespremo ne estus pli aĝa ol 14 tagojn, kaj la vapormaŝinojn ni havus sole ne plenan semajnon. — Proksimume du aŭ tri tagojn ni rapideĝas ĉirkaŭ la terglobo en vaporŝipoj kaj fervojo, kaj nur hieraŭ ni trovis la miraklajn eblecojn de la elektro. — Apenaŭ kelkaj lastaj horoj pasis de la momento, kiam ni ellernis naĝi sub la akvo kaj en la aero. — kaj tuj ni ankaŭ uzis la plej novajn elfrovojn por aranĝi militon en eksterordinaraj dimensioj. — Tion oni cetere ne miru, ĉar ankoraŭ antaŭ unu semajno ni brulmortigadis aŭ vivan ente igadis ĉiun herezulon, kiu kuraĝis havi sian diferencon opinion pri savo de la homo, simile kiel estis publike ŝitataj la intestoj de tiuj, kiuj kuraĝis alie pensi pri la regantoj kaj estis pendiĝataj maljunaj viinoj akuzitaj ke ili havas rilatojn kun diablo. — Ni ja nur unu jaron antaŭe estis ĉiuj senescepte migrantaj sovaĝuloj. (El L. N.)

*] sĥrovodik.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333
NUMERO 27. JANUARO 1930.

AL NIAJ MEMBROJ!

Kiel ni raportas sur alia loko, la komitato de ĈAE en sia kunveno la 17. Decembro 1929 decidis eldoni la januaran numeron de la Asocia Bulteno de nove kun la Progreso. La venonta ĝenerala kunveno decidis, kiamaniere okazos la plua eldonado de la Bulteno. Ni esperas, ke tiu ĉi numero per sia enhavo kontentigos niajn membrojn kaj ni estos feliĉaj, se ili per siaj informoj, konsiloj kaj kritikoj helpos en la redaktado de la plujaj numeroj.

La pasinta jaro 1929 estis jaro de serĉado de novaj vojoj kaj metodoj en nia centro. Se ni tamen ne kontentigis ĉiujn, ni petas pripensi, ke la laboro estas granda kaj da laborantoj malmulte. Ni tre deziras, ke la membraro montru vigan intereson pri la estonteco de nia Asocio kaj ke ĝi partoprenu en la baldaŭa ĝenerala kunveno*) kiel eble multnombro, ne nur per sia persona ĉesto, sed ankaŭ per konsiloj kaj precipe per sinproponoj por kunlaboro.

En tiu rilato precipe la samideanoj de Praha povus multon entrepreni kaj sufiĉus sole neĝranda areto da Prahanoj, konkorde kaj regule laborantaj por krei sekretariejon, kiu jam per sia akurata preciza kaj vigla laboro altirus la laborantojn en la tuta respubliko. Ke tiel povus esti, tion montras al ni la unuaj jaroj de nia Asocio, kiu la 2. de Februaro pleniĝas la dekan jaron de sia ekzisto.

Kun unuigitaj fortoj ni marŝu do en la novan jardekon de nia Asocio!

Por

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

Jos. Eiselt
prezidanto

Rud. Hromada
ĝenerala sekretario

*) La ĝen. kunveno okazos en Marto, kiel ordinare.

EL LA KOMITATO.

La VI. komitatan kunvenon la 30. Oktobro ĉeestis 6 p.: Bloch, Eiselt, Herzigová, Hromada; Šustr, Janda (parte). Kiel gasto S-ro Ginz (parte). Senkulpiĝitaj: Berger, Tarantíková, Dr. Fousek kaj Sklenĉka. Decidoj: Asigni al la redaktinto de la slovaká ŝlosilo D-ro Kamaryt 1000 Kĉ por la preso (en tio 580 Kĉ el la Fundo de la slovaká ŝlosilo); la resto de la kostoj estis kompensitaj per antaŭpago de la mendintoj de la ŝlosilo, laŭ la alvoko siatempo dissendita de D-ro Kamaryt. — Hromada atentigas, ke ĈAE ĝis nun ne pagis kotizojn al Konstanta Reprezentantaro por 1928. Kotizo estas 2 Kĉ por ĉiu membro paginta plenan 16kronan kotizon. La sumon povas do fiksi sole nia kasisto. S-ro Slavík rezignis jam en printempo, kaj persistas en sia decido, sed oni ree lin petos fari la kasistajn laborojn almenaŭ ĝis la venonta ĝenerala kunveno. — S-ro Sklenĉka trovas nekorekta, ke la redaktinto de la esperanta flugfolio pri Ĉeĥoslovakio, eldonita de la fervoja ministerio, ignoras la Asocion, ne mefinte ĝian adreson inter la societoj, al kiuj oni povas peti informojn. (Troviĝas tie sole adreso de Instituto kaj Katolika organizaĵo.) — D-ro Fousek deziras, ke la komitataj kunvenoj okazu sabate, por ke la komitataj ekster Praha loĝantaj povu ilin pli facile partopreni. Oni aranĝos tion laŭ ebleco. — La Paca societo Chelčický deziras, ke Asocio subskribu deklaron okaze de la pacmemora tago 11. Novembro. Faros S-ro Koutek, nia delegito tie. — Membroj ŝuldantaj kotizon ricevos admonilon. — Leteron de S-ro Dalmau pri urbнома leksikono respondis S-ro Bloch.

La VII. komitatan kunvenon la 2. Novembro ĉeestis 4(!) p.: Eiselt, Hromada, Sklenĉka; Šustr; kiel gasto S-ro Kudela el Olomouc. La sola punkto de la pro-

gramo estis afero de la ĉs. kongreso en 1930. S-ro Kudela en la nomo de Esperantista Societo Olomouc prezentas la inviton de la kongreso al Olomouc, Pentekoste. E. S. traktis jam kun la Urbeŝtaro kaj ricevis de ĝi leteron, laŭ kiu, la urbeŝtaro promesas: 1) protektoraton 2) ornamo la urbodomon per ŝtataj kaj esperantaj flagoj 3) pruntoj por neĝrandaj paĝoj salonoj kaj per floroj ornamo estradon, por unu tago (malferma kunveno kaj artvespero), 4) senpaĝe pruntoj por 3 tagoj alian ejon por kunvenoj, 5) kongresa insigno rajtigas senpaĝe uzi la framon, 6) eldonas esperantan gvidlibron, 7) permesos senpaĝan viziton de la urbaj muzeoj. S-ro Kudela prezentas proponon pri la loka kongresa komitato, planon de la programo, sumo de la kotizo (20 Kč). Olomouc estas preta porti kun ĈAE kaj GEL egalan parton de la risko (1/3). Sama divido se estos profito. Deziras antaŭpaĝon por preparaj laboroj. La ĉeestantoj esprimis kontenton, ke la invitanta societo venas kun precizaj proponoj. En la debato estis esprimita demando, ĉu la kongreso ne povus okazi en aliaj tagoj, por ne esti samtempa kun la kongreso de la germanaj esperantistoj en Dresden, kiu estos tre proksima por nord-bohemiaj samideanoj. S-ro Kudela atentigis, ke la invito de Olomouc validas sole por Pentekosto. — La ĉeestantaj komitatanoj principe konsentas kaj la propono estos komunikita al la tuta komitato kaj al GEL. Fino je la 22 horo.

En la VIII. komitata kunveno la 17. Decembro 1929 partoprenis 9 p.: Bloch, Eiselt, Herzigová, Hromada, Dr. Kamaryt, Sklenčka, Tarantíková; Hejnová, Šustr. Senkulpiĝis sin: Berger, Dlouhá, Dr. Fousek, Šupichová, Vondroušek. — **Decidoj:** Korekti kaj kompletigi la protokolon de la lasta kunveno. — Respondi al Ing. Schneider en Karlovy Vary, ke ĈAE ne konsentas pri lia propono stariĝi „Trezoron“. Leteron kun klarigo sendos D-ro Kamaryt. — Skribi al Ĉs. Obec Sokolská en afero de la malŝatiga artikolo kontraŭesperanta en Sokolský Věstník. —

D-ro Kamaryt revenas al siaj leteroj, en kiuj li deklaras kasaciota la deci-

don de la komitato pri la nova eldonmaniero de la Bulteno. S-ro Eiselt defendas la decidon dirante, ke la komitato devis fari iun aranĝon, ĉar La Progreso ne aperis kaj la membroj devis esti informataj pri la agado de la Asocio. S-ro Bloch atentigas, ke S-ro Hromada mem konsentis, ke la komitato sin aranĝu laŭvole, se la Progreso ne aperos ĝis certa tempo. D-ro Kamaryt diras, ke tiu ŝanĝo ĉiokaze devis esti anoncita oficiale en la unua numero de la nova Bulteno kaj plendas, ke la nova Bulteno fakte ne donis al la membroj informojn pri la Asocio. Li proponas, ĉar laŭ la certigo de S-ro Hromada La Progreso reaperas, ke Asocio ĉesu eldoni memstaran Bultenon kaj eldonu ĝin kun la Progreso kiel antaŭe. Post debato la kunveno akceptas la proponon. (2 sindefenoj: Bloch, Sklenčka.) Ĉar laŭ informo de S-ro Bloch, S-ro Ing. Berger jam preparas la trian n-ron kies parto estas jam kompostita, estas akceptata propono de S-ino Herzigová, ke tiu ĉi n-ro aperu kiel decembra kaj tiu kun La Progreso kiel januara. —

Post foriro de la prezidanto Eiselt je la 22.30, prezidas la Vicprezidanto D-ro Kamaryt. — Laŭ propono de F-ino Hejnová la Asocio sendos leteron al Národní Politika por danki pro la regula aperigado de la priesperantaj informoj, redaktataj de F-ino Šupichová.

Slovaka ŝlosilo. D-ro Kamaryt prezentas raporton pri sia agado koncerne la slovakon ŝlosilon. Li mem verkis la slovakon tekston, faris skribajn traktadojn kun ICK, kiu estas posedanto de la eldonrajto kaj cedis la eldonrajton de la slovakon eldono al nia Asocio, helpinte ĝin plue per subvencio de 100 sv. frankoj. Estis eldonitaj 3000 ekzempleroj, kostoj cca 2.100 Kč. El tiu kvanto ekz. estis antaŭpagitaj de diversaj kluboj kaj personoj, precipe en Slovakio (el tio 1.500 ekz. antaŭpagitaj). El la resto 1.300 ekz. troviĝas ĉe Asocio en Praha 300 ekz. (100 plus 200) kaj ĉe D-ro Kamaryt cca 1.000 ekz.

D-ro Kamaryt rekomendas, ke po unu ŝlosilo Asocio dissendu (kun paĝilo) al konataj samideanoj, pri kiuj ni po-

vas supozu, ke ili pagos ĝin kaj eĉ aĉetos pluajn. Akceptita, kun la kondiĉo, ke troviĝos iu, kiu estus preta prizorgi la dissendon.

Kongreso en Olomouc. Ĉar laŭ la informo skribita al ni de E. Societo Olomouc la Germana Esp. Ligo konsentas pri la urbo kaj la dato, la komitato unuanime akceptas la proponon, decidas porti trionon de la risko, ev. cedas al Olomouc trionon de la profito, decidas sendi al Olomouc 500 Kč por preparaj laboroj. 1)

Koncerne la ĝeneralan kunvenon, S-ro Sklenčka demandas la klubon en Brno, ĉu ĝi estos preta fari la lokajn preparojn. Se ĝustatempe venos la jesa respondo, la ĝenerala kunveno okazos tie. 2)

R. H.

1) Tiuj ĉi decidoj fariĝas vanaj, ĉar la 30. XII. CAE ricevis la jenan leteron de E. S. Olomouc: „La E. S. tre kore dankas la favoran decidon por la ĉsl. kongreso en 1930 en Olomouc. Sed konsiderante la lastan leteron de GEL (nekonsentitan al ni, NdR) kaj respektante ankaŭ la deziron de kelkaj eminentaj ĉefaj samideanoj kaj por ne displiti la fortojn en nia lando, ni rezignas je la aranĝado de kongreso dum pentekostoj 1930 en nia urbo favore al Dresden. Se ili bonege sukcesos, tio certe havos ankaŭ bonan influon en nia lando. Ni tamen dezirus plenan ol nur duonan sukceson en nia urbo, kiu en 1930 ne plu povos efektiviĝi. Felician kaj benorican Novjaron 1930. Se eble, ni petas, ke Progreso alportu noticon pri tio, ke ni rezignis favore al Dresden. Plenestime kaj samideane Esperantista Societo Olomouc, Ant. Kudela.

2) La respondo el Brno ne venis, sed laŭ alia demando, E. S. Olomouc skribis esti preta fari la lokajn preparojn por la ĝenerala kunveno.

MORTIS.

Vojtěch Kraus.

Vojtěch Kraus naskiĝis 13. II. 1865 en Praha, studis reallernejon, finis ĝin 1883, en j. 1885 fakis ankoraŭ maturekzamenon gimnazian. Tiun jaron li fariĝis oficisto ĉe la magistrato de la ĉefurbo Praha kaj servis tie al publikaj aferoj ĝis 1920. Li venis al la plej alta grado de sia ofickategorio fariĝinte direktoro; multajn jarojn estis ĉefo de la adresara fako kaj redaktis en tiu funkcio krom la oficiala adresaro de la urbo diversajn aliajn oficialajn gvidilojn kaj jarlibrojn. Precipe cinda estas Historio de la urba administrado de la reĝa ĉefurbo Praha en jaroj 1860—1880 (Dějiny obecní správy král. hlav. města Prahy za léta 1860—1880) en du volumoj. Pensiĝinte li akceptis esti direktoro

de la „Masaryka Fundo“, fakode la prezidenta oficejo. Li edziĝis 28. V. 1892; havis du infanojn. La filo inĝeniero Vojtěch Kraus mortis 28-jara, la filino Adela edziniĝis Fojtová; ŝi estas ŝatata ĵurnalistino, ŝia edzo konata skulptisto.

Vojtěch Kraus estis ankaŭ ekster sia profesia ofico tre aktiva, intense kaj diversmaniere. Li estis malkvieta kaj sciema spirito. Ĉiun sian liberan tempon li dediĉis al senproŝita agado en multaj filantropiaj kaj klerigaj korporacioj. Lia edzino sinjorino Matylda Krausová estis lia fidela kunlaborantino, kaj ili estis en tiu agadsfero ekvivalentaj kunlaborantoj kaj kamaradoj de egala valoro.

Esperantisto li fariĝis en j. 1901 kaj post unu jaro li estiĝis prezidanto de la Esperantista klubo en Praha fondita 9. XI. 1902. La unua prezidanto de la klubo estis E. Weinfurter, sed nur kiam oni trovis sinjoron V. Kraus kaj sukcesis, ke li akceptu prezidantecon de la klubo, la klubo vivo ekmarŝis sur la taŭga vojo. Persistemo kaj ordamo de la nova prezidanto donis al la juna societo vivkapablon. Persisti, tio estas ĉe tia laboro, kia estas la nia, la plej malfacila sed la plej merita metodo. Ĝi estis unu el la plej eminentaj ecoj de la mortinta samideano. Li estis ĉe ni unua delegito de UEA, lia nomo kaj adreso estas en unua jarlibro; kaj li restis delegito ĝis sia morto. Dum Antverpena kongreso li estis nomita honora membro de Universala Esperanto-Asocio pro dudekjara fidele servado. Liaj esperantaj laboroj estis tre diversfakaj. Plej signifa en komenca tempo estis, ke li sukcesis havigi al nia movado unuajn oficialajn rilatojn kun la publikaj aŭtoritatoj. Precipe signifa estis tiam de li iniciatita esperantista kunlaborado kun la komitato de la bohema sekcio en aŭstria ekspozicio en London en j. 1906. La klubo per esperanta korespondado sukcesis vekti en Britujo intereson pri la bohema sekcio, kiu intereso estis pruvita per konkretaj dokumentoj. V. Kraus kaj la klubo ricevis de la ekspozicia komitato „honorajn atestojn“ pro „valoraj servoj faritaj“. Ankaŭ grave estis, ke Kraus sukcesis esti akceptita kiel esperantisto en sekcio por fremdlandaj rilatoj de la „Nacia konsilantaro bohema“. Prezidanto de la klubo li restis ĝis komenco de malkaŝa malkonsento inter ĉefaj esperantistoj en jaro 1907. Kraus fariĝis partiano de la Bohema Asocio Esperantista fondita en j. 1908 por ebligi poresperantan laboron al tiuj, kiuj preferis aliajn metodojn ol estis metodoj preferataj de fiana Unio. Kraus estis koro honesta kaj malmimema; volonte li iris kun junuloj fanfaronaj kaj obstinaj, predikantaj direktecon senperan ankaŭ en esperanta labormanco. Li estis elektita vicprezidanto de la nova asocio; kaj restis fidela al ĝia programo ĝis kunfandiĝo de la Asocio kun la Unio en j. 1918.

V. Kraus mortis la 26. septembro 1928.

La nobla koro de la pioniro de la unua horo ne batas plu. Estas morta la klara intelekto, kiu ekzistis per kaj por senĉese koncepti planojn. Sed ne estas morta verko rezultinta el tiu laborado.

Stan. Kamaryt.

Stanislav Stejskal

Stanislav Stejskal, profesoro, la meritplena laborinto en internacia organizo de blinduloj, mortis 27. XII. 1929, nur 42-jara. Li estis de- post jaro 1915 profesoro de la franca kaj ger- mana lingvoj ĉe reallernejoj en Praha kaj akiris ĝeneralan ŝaton pro siaj spirita nobleco, preciz- eco, fidindeco, bonkoreco kaj afableco. Krom instruista profesio li dediĉis sian grandan e- nergiĝon kaj laboremon por helpado al la blind- uloj. Li instruis al ili esperanton, instruis ilin legi, klopodis por doni al ili taŭgajn tekstojn legotajn, organizis ilin enlande eĉ inter- nacie. Per tio li fariĝis en blindula skribado fakulo, kian oni malofte renkontas. En jaro 1920 estis laŭ lia iniciato fondita esperanta du- monata gazeto por ĉeĥoslovakiaj blinduloj Aŭ- roro, presita en Braillea punktskribo, kiun li redaktis ĝis sia morto. En j. 1922 li fondis Societoj de ĉeĥoslovakaj nevidan- taj esperantistoj (SOCNE), kiu havas nun 65 membrojn. Kiel fakulo en blindula preso li ofte kontaktis kun ministerio de instruado. Per dekreto el 31. VIII. 1922 li ricevis „laŭdan mension pro fervora kaj senprofita porblindula zorgado, precipe pro pliboniĝado de la nevid- uloj per ebligo de nobla legado“ Kiel fakula spertulo de la blindula preso li estis en j. 1922 nomita estro de kursoj pri edukado de blindu- loj kaj reprezentanto de la ministerio en la II-a kongreso de blinduloj kaj XV-a kongreso esp- ista en Helsinki, en j. 1923 en la ambaŭ kon- gresoj en Nürnberg. En j. 1925 li estis reko- mpenĉita pro sia partopreno en enketoj pri ŝar- ĝito de simboloj en ĉeĥoslovaka blindula skri- bado. En j. 1927 li reprezentis ministerion en la VI. blindula kongreso en Danzig, en j. 1929 li kondukis ekskurson de ĉsl. blinduloj en Ju- goslavion. — Plenaj de laboro estis liaj fagoj. Daŭre brulis en lia koro viva flamo de kompato al malfeliĉaj proksimuloj. Ploris dum lia kre- macio la 31-an de decembro 1929 multaj liaj amikoj, kolegoj, studentoj, blinduloj, esperan- tistoj. Li estis edzo tre amanta sian familion. Funebros pro li vidvino kaj tri knaboj 10—6 jaraj. S. K.

J. F. Khun (1869 — 17. XII. 1928) propa- gandisto de esperanto inter Ĉeĥoj en la unua pionira epoko dum la jaroj, kiam Th. Ĉejka eldonis unuan eldonon de sia lernoĵbro Khun tiam verkis kaj eldonis broŝuron en esperanto Majstro Jan Hus, kiu siatempe signifis gravan faron. Khun sciis pasive 20 lingvojn, el kiuj li tradukadis. Esperanton li ankaŭ ne sciis funde, la relative bona lingvaĵo de lia libreto pri Hus estas verko de Ĉejka, kiu legis la manu- skipton kaj lingve ĝin korektis antaŭ la preso. Pli poste Khun estis allogita de reformoj, kaj estis citata de idistoj kaj okcidentalistoj, sed ne ŝajnas, ke li estus esinta tro aktiva tiurilate. Profesie li estis instruisto, vivis multajn jarojn en Jiĉin, kie li ankaŭ mortis. Ni hono- riĝu en nia memoro pri li precipe lian senlacan laborenerĝion, kiun li disponiĝis por ĉio, kion li trovis subteninda. S. K.

Karel Vorovka, ĉeĥoslovaka filozofa profesoro de filozofio en naturscienca fakultato de universi- tato en Praha, mortis 15. I. 1929, nur kvindekjara. Li estis eksterordinare originala pensulo, kiu elir- inte el esplorado kaj primeditado de metodoj por kono matematika kaj veninte al limoj de ĉiuj raciaj metodoj ne malesperis pri ebleco de ĉia homa kono. Kontraŭe li venis al konvinko, ke pli profunda g n o- s e o ol racia scio estas ebla. Vorovka estis spiro- rito nekutime logika. La problemojn li finpensis ĝis ilia efektiva fino. Tial li venis ankaŭ al konviko pri bezono kaj ebleco de lingvo internacia kaj pri taŭgeco de esperanto por tiu celo. La koncernaj traktajoj, kiujn ni publikigis en esperanta traduko en Progreso kaj en Nova Eŭropo naskiĝis ĉe li sen ia ajn persona influo de esperantistoj; ili estis tute spontanea rezulto de lia konsekvenca meditado. Pro tio estas lia rememoro speciale kara al ni, S. K.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

— Na 22. světový kongres esperantistů, který se bude konat letos v srpnu v anglickém Oxfordu, se přihlásilo do konce prosince m. r. celkem 116 účastníků ze 7 států (Anglie, Belgie, Francie, Německo, Polsko, Itálie, Holandsko).

— V Moskvě vyšla významná jazyková pomůcka V. Varankina: „Teorie de Esperanto“. Obsahuje zajímavé staří z teorie mezinárodní řeči, o etymologii a fonetice esperantské, morfo- logii a slohu. Tato kniha jest nezbytnou příručkou všem, kteří se připravují ke zkouškám z esperanta.

— 21. kongres britských esperantistů jest připravován v červnu v Nottinghamu.

— Čtyři rozhlasové stanice v Australii a Oceánii vysílají v esperantu: Melbourne, Brisbane, Auckland a Christchurch.

— Při ženevské universitě byla pro letní semestr minulého roku založena esperantská katedra. Na žádost o její zavedení se podepsalo 10 universitních profesorů.

— Místopředsedou přípravného výboru 22. kongresu esperantistů v Oxfordu stal se proslulý anglický jazykozpytec prof. W. E. Collinson z university z Liverpoolu.

— První ženskou organizací esperantskou v Praze byl dámský odbor „Klubu esperantistů“, k jehož zakladatelkám náležela paní J. Náprstková. Vznikl roku 1904.

— „Skautská esperantská liga“ v Anglii ohlásila závodění ve znalosti esperanta pro své členy a skauty-neesperantisty. Odměnou bude volný prázdninový pobyt v Holandsku.

— Londýnská „The Royal Society for the Protection of Birds“ rozesílá letáky a nálepky, jejichž účelem jest propagace pro ochranu mořského ptactva, které jest hubeno použitým olejem, vypouštěným paroloděmi do moře. Letáky a nálepky byly vydány anglicky, francouzsky, německy, italsky, španělsky a esperantsky. Zájemcům je zdarma zasílá Mr. Frank E. Lemon, Secretary, London, 82, Victoria Street, S. W. I. Julie Šupichová.

Dr. STAN. KAMARYT :

DIVERSAJ SIGNIFOJ DE LA KONCEPTO PRI MATERIO.

Kvankam filozofio pretendas esti plej intime kunligita kun la logiko, kaj unu el la plej ĉefaj celoj de la logiko estas difinado kaj fiksado de la nocioj, tamen ĝuste en la filozofio estas la diversaj vortoj la plej oftaj. Ni montru la diversajn signifojn de la materio :

En la natursciencoj (fiziko, kemio, biologio) ĝi signifas la substraton de ĉiuj fenomenoj percepteblaj per sensoj, ilian plej universalan nocion, kiu kunigas la kvalitojn komunajn al ĉiuj fenomenajoj. Tiuj komunaj kvalitoj estas: pezo, inertececo, netraiebleco; la pezo estas el ĉiuj fenomenoj plej precize mezurebla. Kvanto de la materio estas mezurata laŭ ĝia efiko statika (tio estas laŭ ĝia pezo) aŭ laŭ ĝia efiko dinamika (tio estas laŭ akcelo, kiun difinita forto donas al la mezurata materio). Mezurado statika kaj dinamika donas egalajn rezultojn: pezeco kaj inertececo de la materio estas proporciaj. Kvanto de materio restas ĉe ĉiuj reakcioj sensanĝa, la kvalitoj de la reakciantaj ŝtofoj ŝanĝu kiom ajn, la sumo de pezoj de la reakciantaj ŝtofoj antaŭ la reakcio kaj post la reakcio restas la sama. (Leĝo pri konservo de materio, Lomonosov, Lavoisier.) Laŭ sia formo la materio estas malkontinua, konsistanta el malgrandaj eretoj nomataj molekuloj, kiuj konsistas el nemultaj atomoj, ne plu divideblaj; do la materio ne estas dividebla senfine. Atomoj kaj molekuloj estis en j. 1804 hipotezitaj de Dalton. En j. 1918 iliaj pezaj kaj grandaj estis mezuritaj de Perin kun tioma precizeco, ke ilia ekzisto estas tiom certa, kiom ekzisto kaj dimensioj de ĉielaj korpoj. La malplej peza inter ĉiuj atomoj, atomo de hidrogeno, pezas 1.47×10^{-24} gramojn kaj havas volumenajn dimensiojn da 10^{-3} cm. Laboroj komencitaj de Rutherford kaj Soddy finis en starigo de hipotezo, ke la atomoj estas kunmetitaj de elektronoj; elektrono pezas dumilonon da hidrogena atomo. El tio sekvas, ke en realo la korpoj enhavas tre malmulte da spacon pleniganta materio; homa korpo konsistus, se ni eliminus ĉiun neplenigitan spacon kaj kunigus ĉiujn ĝiajn elektronojn kaj protonojn en unu tutaĵon, sole el ero da materio malfacile videbla per grandiganda vitro.

En psikologio la materio signifas la substraton de ĉiuj fenomenoj korpaj, kontraŭmetitan al

fenomenoj animaj. Ĉia dualisma psikologio diferencigas laŭ povebleco plej subtile inter fenomenajoj korpaj (okazantaj per ŝanĝoj en stato de materio) kaj inter fenomenajoj animaj (okazantaj per ŝanĝoj en stato de „konscio“).

Laŭ senco Aristotela kaj skolastika materio estas ĉio mensa aŭ korpaj, kio estas donita al la aktiveco por plua prilaboro. En tiu senco materio estas ĉiam kontraŭmetita al formo.

Ankaŭ signifoj de *materiismo* (aŭ *materialismo*, kio estas samsenca) estas diversaj.

En metafiziko: Doktrinoj, laŭ kiuj materio estas la sola reale ekzistanta substanco. Ĉar ili el la diversaj ecoj de la materio rigardas ne la saman kiel la esencan, estas diversaj materiismoj, sed ĉiuj kredas, ke materio estas perceptata kiel aro de objektoj disaj, imageblaj, transigeblaj, el kiuj ĉiu okupas fiksan parton de la spaco. Spirito, spiriteco, spite sian diferencecon, dependas de la materio estante ĝia kvalito, stato, efikaĵo, kreitaĵo funkcio, plej delikata speco.

En psikologio: Doktrino, ke la solaj sciencoj esploreblaj fenomenajoj estas tiuj fenomenajoj, kiuj havas substraton materialian kaj ke sekve oni povas esplori fenomenajojn de konscio sole tiamaniere, ke oni serĉas iliajn rilatojn kun la fenomenoj fiziologiaj, ekz. nervaj, organaj kaj simile.

En etiko: Praktika instruo, laŭ kiu fundamentaj interesoj de la homa vivo estas sano, riĉeco, bonfarto, plezuro, kiuj estas la solaj instigiloj de la homa agado. Materiismo etika ne estas senpera konsekvenco de materiismo metafizika kaj ankaŭ ne estas ĉe filozofoj ambaŭ materiismoj kunigitaj.

En sociologio: *Materialismo historia*: Termino kreita de Engels por nomi doktrinon de Karl Marx, laŭ kiu ekonomiaj fenomenoj estas bazo kaj kaŭzo determinantaj ĉiujn historiajn okazaĵojn. „Ekonomia strukturo de socio estas reala bazo, sur kiu leviĝas jura kaj politika konstruitaĵo, kaj al kiu respondas fiksitaj formoj de la socia konscio... La produkta maniero de la materia vivo kondiĉas entute la socian, politikan kaj spiritan vivadon.“ (K. Marx.)

Ni aldonu ankoraŭ pro pleneco de la terminaro: *Materialisto*, partiano de la materiismo, kaj *Materiulo*, homo aganta laŭ devizoj de la etika materiismo.

ŠKOLA A MY

Školská reforma v našem státě jest na postupu. Nejen, že se o ni píše, mluví, anketuje, ale jest již nejpovolanějšími kruhy prakticky prováděna. Konečně nastává přelom v požadavcích, týkajících se zvýšení všeobecné kulturní úrovně.

Požadavek jednotné školy, která stojí v popředí dnešního pedagogického ruchu, jest zajiště spojen nejen s organizační nově školy a s cestami, jež vedou k zdárnému cíli, ale i s novou náplní učebních osnov.

Krátce: budeme učit všemu, co představuje uskutečnění zdemokratisovaných idejí a všelidského pokroku.

Nastane mnohostranná a rozsáhlá revize všech způsobů a prostředků, jimiž povznese se kulturní rozvoj národů vůbec. Cestou vývoje: od nejmenších do rodin, od rodin k národu. Práci pro české dítě a jeho lepší budoucnost připravíme šťastnější život všem!

A v této nemalé a významné práci musí českoslovenští esperantisté spolupracovati. Protože naše hnutí zápasí již téměř polovinu století o mezinárodní dorozumívání, jehož problém -- o tom nemůže myslící člověk pochybovati -- se přímo dotýká pedagogiky. Jednotná škola potřebuje řešení i tuto palčivou otázku, čím dříve, tím lépe.

Zpzdili jsme se již za ostatními národy, my, národ Komenského. Synové a dcery velikého učitele národů, který již v XVII. století toužil po jednotné, umělé řeči dorozumívací.

Musíme míti řadu pohotových pracovníků, musíme získati a dobytí učitelských řad. A nemožno-li hned a všude, aspoň v našich řadách se snažme o řádný učitelský dorost, o zdatné a zkoušené učitelské síly. Potřebujeme jich, chceme-li, aby se o nás vědělo. Jsme zodpovědni příští generaci za vítězství tohoto požadavku.

Naše ústředí (Svaz a Institut) má v zimním období vitanou příležitost uspořádati opět a opět kursy pro přípravu k státním zkouškám z esperanta. Agitujme pro jejich úspěch a pomáhejme!

19. XI. 1929.

Julie Šupichová.

OBCHODNÍKŮM!

Největší prospěch z rozšíření mezinárodní pomocné řeči bude míti obchod. Jest tedy v zájmu obchodníků a ovšem též v prvé řadě esperantistů ob-

chodní korespondenci zaměstnaných, aby espo propagovali.

Jest to poměrně snadné. Ke každému cizojazyčnému dopisu, který píšete svému novému dodavateli, zvláště ke každé objednávce, přiložte lístek dle dolejšího vzoru:

ESPERANTO, lingvo internacia.

Ni ne scias ĉu vi, aŭ iu el viaj oficistoj, komprenas boheme (ĉeĥe). Tial, por ne perdi tempon, ni ne skribis al vi boheme. Sed, se iu el via firmo scias boheme aŭ esperante, tiam bonvolu korespondi kun ni en unu el tiuj du lingvoj.

Wir wissen nicht, ob Sie oder jemand von Ihren Beamten böhmisch (tschechisch) kann. Darum, um die Zeit nicht zu verlieren, schreiben wir Ihnen nicht böhmisch. Sollte aber jemand von Ihrer Firma das tschechisch oder das Esperanto beherrschen, dann korrespondieren Sie bitte mit uns in einer dieser beiden Sprachen.

Lístky takové (leč pouze esperantské) dodá v přiměřeném množství zdarma (proti předchozí náhradě poštovního) inž. R. Novák, Plzeň, Manesova 39. Též na přední stranu zaslaných mu korespondenčních lístků razítkem takové prohlášení vytiskne.

Razítkem tím možno tisknouti i přímo na dopisy do zásoby, ale doporučuje se používati přiloženého lístku, neboť dodavatel současně pak dopis vyřizuje a současně se může o překlad přílohy postarati.

Samoukům i žákům v kursech

doporučujeme knihu:

Dr. ANT. ŠILHA,

gymn. profesor a lektor esperanta

UČEBNICE ESPERANTA

Obsahuje souvislé články, jimiž každé pravidlo žák ovládne pomocí otázek a odpovědí. —

Naučíte se řeči, nejen mluvnici.

Cena 1 výt. 10 Kč, poštou 10.60 Kč. Při větších objednávkách na každých 5 výt. 1 zdarma. — Objednávky obratem po zaslání peněz složenkou, kterou si vyžádejte u

LA PROGRESO

PRAHA VII., SOCHAŘSKÁ 333

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO: GENÈVE, SVISLANDO



Servaro: Bibliografia Servo — Eldona Servo — Ekspozicia Servo —
 Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo —
 Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Re-
 klama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada
 Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika
 Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 623.

Nova administra jaro de UEA.

Ĝi komencis la 1-an de Novembro. Al ĉiuj membroj estis tuj en komenco de la monato senditaj specialaj numeroj de „Esperanto“, kiuj sur 6 paĝoj donas klaran kaj detalan informon pri la avantaĝoj de la ĝustatempa realiĝo.

Nekredebla, sed tamen vera.

S-ro Herold Kesik varbis por UEA pasintjare samideanon St. Vizitante nun ĉiujn membrojn en Bratislava por enkasigi la kotizojn por 1930, li estis tre surprizita, kiam s-ro St. tre klare proklamis, ke li ne plu deziras esti membro de UEA. — Kial?! — Tuj post kiam li pasintjare pagis sian kotizon al UEA, li ricevis membrokarton kaj kuponaron servopetan. Tion li komprenas. Sed post nelonge li ricevis iun libron, dum la tuta jaro li ricevadis ampleksan gazeton kaj fine en somero venis plia sendaĵo — la jarlibro! Li absolute ne povas kredi, ke UEA povas ĉi-tion ĉion doni por la kotizo de nuraj Kĉ 50.— kaj li tre timas, ke li nun, en fino de la jaro, ricevos iun kalkulon pri la senditaj objektoj kaj poste sekvos admono, Multaj estis la klopodoj de s-ro Kesik. S-ro St. ne kredas, ke UEA povas doni tiom por Kĉ 50.— kaj por eviti malagrablojn, li ne volas realiĝi...

Nia celo por 1930.

En la venonta numero ni donos fie- ĉi interesajn ciferojn pri la movado de niaj membroj en nia teritorio dum la lastaj kvar jaroj. Por la futmondo UEA donis por 1930 jenan celon: 10.000 membroj kaj delegitoj en 2000 lokoj. Ambaŭ celoj estas atingeblaj, se la esperantistaro fine komprenos la fakton, ke bone funkcianta, sekure vivanta UEA

estas la spino de la esperanto-movado. En Ĉeĥoslovakio tion ĉi komprenis jam multaj, kvankam ne ĉiuj. Kun fido ni eniras novan administran jaron, fiksante por nia teritorio la celon de

1500 membroj kaj

400 lokoj kun la delegitoj.

Ĉu ni sukcesos atingi la belan ciferon de 1500 membroj, aŭ ne, tio dependos ĉefe de la aĝemo kaj energio de niaj delegitoj kaj vicdelegitoj. La teritoria oficejo faros sian eblon por subteni la ĝeneralan varbadon. La cifero de 400 lokoj kun delegitoj estas atingebla kaj ĝi certe estos atingita. Jam nun, Ĉeĥoslovakio kun 332 lokoj kun UEA-delegitoj, estas lando tre facile alirebla por ĉiuj eksterlandaj UEA-anoj. Plimultiĝantaj vizitoj el eksterlando bele pravas la fakton, ke niaj delegitoj servas bone. Ne mankas skribaj dokumentoj pri tio. Oni komprenu: servante bone al eksterlandano oni servas ankaŭ al sia patrolando.

Premion por frua pago rajtas nur tiu kies kotizo venis al la Teritoria Oficejo ple, malfrue la 31-an de Decembro. Ne plendu kiu ne rajtas!

Respondkuponoj de UEA unua serio ĉesis validi la 31-an de Decembro 1929 — ne plu sendu ilin al ni, ĉar ni ne plu rajtas ŝanĝi ilin.

Stato de la membraro en nia teritorio la 31-an de Decembro 1929:

1 Dumviva Membro
 11 Membroj-Subtenantoj
 475 Membroj-Abonantoj, el kiuj 79 novaj
 154 Membroj, el kiuj 40 novaj

641

Delegitoj en 336 diversaj lokoj.

H. K. B.:

REVIVIGITA ZAMENHOF

I.

Libro, kiu tre prave meritas esti ne unufoje legata, sed ofte relegata kaj atente studata de ĉiuj esperantistoj, libro, kiu estas vere bela donaco al la nuna kaj venontaj generacioj de esperantistoj, libro, el kiu parolas al ni kaj al la venontoj la kreinto de nia lingvo kaj fondinto de nia movado Zamenhof mem en la sama modesta, pacienca kaj saĝa maniero kiel li parolis en libroj, broŝuroj, gazetoj, leteroj kaj kunvenoj al la areto da samideanoj de la unua epoko de esperantismo, estas granda kaj bela volumo „Originala verkaro“ de d-ro L. L. Zamenhof, redaktita de prof. d-ro Joh. Dietterle kaj eldonita de f-o Hirt & Sohn.

Tiu ĉi libro estas grava historia dokumento, kiu revivigas ne sole la kortuŝan vivon, admirindan laboron kaj internan evoluon de Zamenhof, sed ankaŭ sortojn de la lingvo kaj movado dum la unuaj jaroj de ĝia ekzisto, revivigas per propraj vortoj de Zamenhof ĉiujn belajn idealojn kaj celojn, ideojn kaj principojn, pensojn kaj sentojn, esperojn kaj dolorojn, laborojn kaj klopodojn de la majstro kaj liaj disĉiploj. Tiu ĉi libro, en kiu estas pene kaj zorge kolektita preskaŭ ĉio, kion Zamenhof originale verkis kaj publike parolis, aperigas al la leganto surprizigan kvanton da artikoloj, leteroj kaj paroladoj konataj sole al nemultaj malnovaj esperantistoj, sed grandparte malmulte konataj aŭ tute nekonataj al la nuna esperantistaro. Kun pravaj miro kaj admiro — kaj ne sen forta kormovo — la leganto ĝuas la riĉajn fruktojn de ĝiganta, senlaca, diligenta kaj preciza laboro de granda spirito kaj nobla animo de Zamenhof.

El tiu ĉi belaspekta kaj bonstila libro parolas al la esperantistaro ne sole ĝenia kreinto de la lingvo, fervora pioniro kaj sindona organizanto de nia movado, unua aŭtoro kaj tradukanto de niaj literaturaj trezoroj, sed ankaŭ althonesta kaj honorinda viro, ideoriĉa pensulo, bonega stilisto, talenta poeto kaj verkisto, alte klera instruanto, modesta, sed energia batalanto kaj pacienca suferanto, en tiu ĉi libro rebrilas estiminda vivo plena de pura idealismo, belaj intencoj, granda laboremo, mirinda akurateco, senlima pacienco, doloraj suferoj kaj neplenunĝitaj esperoj. Tiu ĉi libro estas la plej bona monumento al la homo, kiu multon donis al la mondo, sed malmulton ricevis de ĝi...

Detala kritiko de la laboro de la redaktinto s-ro Dietterle estas necesa, ĉar lia verko longe estos bazo por specialaj studoj kaj fonto de ĉiuspecaj informoj. Sed justa, eĉ se severa, kritiko ne estas farebla de unu persono kaj tuj nun, ĉar por tio mankas rimedoj de kontrolo. Sole dum tempo diversaj personoj havantaj okazon studi originalajn tekstojn kaj kompari ilin kun represoj, povos montri eblajn mankojn kaj erarojn — verŝajne ili ne estos grandaj nek multaj, kaj certe ne tro gravaj. Nur dum tempo oni povos kritike esplori kaj juĝi kompletecon kaj fidelecon de la kolekto kaj ĝusecon de la decidoj pri la zamenhofeco de pseŭdonimaj kaj anominaj artikoloj — nun estas por ni garantio de fideleco la persono mem de la redaktinto, lia kapableco, seriozeco kaj precizeco. Alie oni povas kritike juĝi sole ordigon, ĝeneralan aranĝon kaj eksteran aspekton de la volumo. En tiu ĉi rilato povas aperi opinioj tre diversaj, ofte egale pravaj kaj egale malpravaj, sed ili estas malpli gravaj, precipe, se oni rigardas gravecon de la kolektita materialo kaj dubecon de ĝia baldaŭa reeldono influita de bonintenca kritiko.

Generale oni povas akcepti la ordigon de la redaktinto, kvankam iuj povus deziri kaj rekomendi ian alian (kronologian, laŭteman k. s.) — ĝi estas simpla kaj facile superriĝardebla. Eble la artikoloj pri temoj nerilatantaj la lingvon kaj movadon (dediĉitaj ekskluzive al la homaranismo) povis esti apartiĝitaj en speciala ĉapitro. Estas tre laŭdinde, ke la redaktinto envicigis sole tekstojn, pri kiuj li estas absolute certa, ke ili devenas de Zamenhof, tamen eble ne estus sen utilo apartiĝite represi en speciala aldono ankaŭ tiujn tekstojn dubajn, ĉe kiuj la aŭtoreco de Zamenhof estas tre kredinda; certe almenaŭ la antaŭparolon el la verko de Trompeter. Senkaŭza ŝajnas al ni ellaso de du ĉapitroj el la „Unua libro“ (kiuj kun sia antaŭparolo bone taŭgas en la ĉapitron „Traktaĵoj“). Ankaŭ ŝajnas al ni, ke nun ne ekzistas jam motivo por respekti la malpermeson(?) de Zamenhof pri represo de reformaj projektoj; la represo ne sole estas sendanĝera, sed kontraŭe ĝi povas esti utila, ĉar ĝi klarigas, „lumigas“, al la nuna leganto interesajn detalojn kaj punktojn de lingvaj problemoj. Iomete stranga kaj malŝpara estas represo de la artikolo „Esperanto kaj Volapük“ el „Germana esperantisto“ (II. 110.), kiu estas sole represitaj fragmentoj el la origina artikolo el „La Esperantisto“ (III. 1.) — ĉu la redaktinto efektive preterrigardis, ke la paĝoj 227-8 kaj 260-1 estas identaj?

Estas granda merito de prof. d-ro Joh. Dietterle, ke li entreprenis la delikatan kaj malfacilan laboron kolekti kaj ordigi riĉegan materialon dissemitan ĝis nun en multaj malnovaj, maloftaj kaj plejparte nericeveblaj broŝuroj, libroj kaj gazetoj, havigi al si tekstojn de presajoj kaj leteroj tenataj en posedo de multegaj privataj personoj. Lia tasko estis certe bela kaj utila, sed ne sen malhelpaĵoj, kiuj akompanas precipe tian unuan provon. Sinjoro Dietterle sukcesis venki la malhelpaĵojn mirinde bone kaj oni povas fidi, ke la volumo redaktita de li estas efektive tiom kompleta kaj fidela, kiom oni povis tiutempe atingi. Ŝajnas, ke la definitiva kolekto de estontaj esploristoj ne estos tro diferenca de tiu ĉi nuna, precipe post kiam en la promesata suplemento aperos tiu amaso da leteroj, kiun iliaj posedantoj hezitis ĝis nun proponi por publikigi. Eĉ se oni nove trovus iun artikolon de Zamenhof aŭ konstatus, ke iu artikolo ne apartenas al li, la graveco kaj valoro de tiu ĉi unua kolekto neniam malgrandiĝos: la materialoj ĉi tie jam kolektitaj estas sufiĉaj por povi aserti, ke la esperantistaro posedas nun plenan kolekton da originalaj verkoj de Zamenhof en unu volumo. Tio estas fakto tre ĝojiga kaj s-ro Dietterle povas esti feliĉa, ke pro tio la esperantistaro devas danki al li. El lia verko rigardas kaj parolas al ni Zamenhof mem kvazaŭ vivanta — neniuj bibliografioj povus vekti ĉe ni pli fortan impreson, ke vivanta Zamenhof staras antaŭ ni, ol tiu ĉi bela libro, kiu estos longe intima ligilo inter la vivanta generacio esperantista kaj mortinta Zamenhof. Kaj por longa tempo ĝi estos bazo por ĉiuspecaj sciencaj studoj kaj esploroj de lingvistoj, filologoj literaturistoj, historiistoj, psikologoj ktp. Sed ĝi estu ankaŭ instigilo por ni: atingi tiun modelon de laboro, kies bildon ni vidas en tiu ĉi tuta verko!

Ĉiu aprobas, ke la tekstoj origine presitaj sen supersignitaj literoj kaj kun disigitaj vortelementoj estas represataj laŭ la nuna, ne la tiama, skribmaniero, ke estas korektitaj evidentaj skribaj kaj presaj eraroj kaj konataj arkaikaj formoj. Sed malpli ĝenerale jam oni konsentos, ke la redaktinto sentis bezonon akordigi la skribmanieron de komencliteroj ĉe kelkaj vortoj (ĉe la vorto „esperanto“ kaj ĝiaj derivaĵoj, oficialaj institucioj, personaj titoloj, pronomo „vi“) — tiu laboro estis senutila kaj nenecesa, eĉ se ne malutila; per ĝi la redaktinto fakte trudis al la leganto sian — eble pravan, sed ankaŭ eble malpravan — principon kaj malebligis al la leganto kontroli la veran staton de la afero ĉe Zamenhof (peno

pri tia akordo estas pravigita en lernolibroj kaj legolibroj, sed ne en dokumentoj). Sed — tio estas malgravaĵo kaj tuŝos malmultajn legantojn. Certe oni laŭdos, ke tre klare estas apartigitaj (per literoj) la vortoj de la redaktinto kaj tiuj de la verkinto. Manko de komentario estas bedaŭrinda, sed necesa, ĉar la libro estus tro granda. Feliĉe tiu ĉi manko estas facile forigebla per speciala verko, pro kiu oni estus tre dankaj al la redaktinto.

Sed grava manko — malofte konstatabla ĉe germana profesoro — estas manko de indekso, alfabeto registro, sen kiu la leganto de tia libro estas kvazaŭ senmana. Vere, la redakto de tia indekso estas tre malaĝrabla laboro kaj krom tio oni ŝparis ĉi tie lokon, sed ĝia valoro estas tia, ke estus dezirinde publikigi ĝin en la esperata suplemento (eble grupeto de junuloj, studentoj povus helpi per tiu ĉi laboro). Ankaŭ la frono'ogio estus bona, sed ne tiom necesa. Tre laŭdindaj estas precizaj notoj pri fontindikoj.

La ekstera aspekto de la volumo estas tre plaĉa kaj meritas ĉian laŭdon: preso klara, papero bona, bindaĵo bela. Prezo bedaŭrinde — ĉe kurzo de germana marko — estas iom alta (Rm 15.— = Kĉ 120.—), sed la valoro de la libro multe superas la prezon.

Sume: S-o Dietterle kaj firmo Hirt & Sohn povas fiere diri: gravan kaj valoran verkon ni donis al la tuta esperantistaro. Ankaŭ al vi, nia leganto!

Daŭrigo.

Traduko el la norvega lingvo en la ĉeĥian per esperanto.

La grava eldonejo „Orbis“ en Praha (XII., Fochova 62) eldonis en novembro 1929 kiel unuan volumon de la nova kolekto „V Evropě a za oceánem“ („En Eŭropo kaj trans Oceano“) la libron kun sekvantha ĉeĥlingva titolo: Odd Arnesen: Per aerŝipo al la norda poluso. Traĝedio de la aerŝipo Italia. Tradukis Otto Ginz laŭ esperanta traduko de Jense Schjerve. Kun granda nombro de ilustraĵoj en la teksto. En Praha 1929. Eldonejo „Orbis“ en Praha XII. La libro havas 168 paĝojn 17×25 cm. En sia antaŭparolo la tradukinto informas, ke lia tradukaĵo estis farita laŭ la esperanta traduko, kiun el la norvega manuskripto faris Jens Schjerve laŭ la peto veninta el Japanujo, kie volis publikigi japanan tradukon la ĵurnalo „Tokio Asahi Shinbun“. Esperanto fariĝis tie ĉi peranto traduka, kiu ebligis, ke la tradukanto ne laboris kun lingvo por li fremda, kaj tiel povis kvazaŭ

senpere transdoni la fremdlingvan tekston. La ĉefa leganto povas sole jesi pri la fina konstato de s-ro Ĝinz, ke ankaŭ sur tiu kampo esperanto povas doni valorajn servojn. Kaj danki al li pro la bone farita laboro. La enhavo mem de la libro estas tre leginda. Odd Arnesen estas norvega ĵurnalisto, kiu venis en havenon Kongsfjorden en urbeton Ny Alesund, el kie ekflugis Italia por sia malfeliĉa vojaĝo, por raportii pri la entrepreno. Li do estis plej bone antaŭpreparita, por estiĝi post la tragedio tre kompetenta kaj senpartia informanto. Tial tre valoras legi tiun libron, kaj ni ĝin tre rekomendas al niaj ĉeĥoslovakaj legantoj. Bele presita libro kun tre instrua karto de Svalbardo kostas 40 Kč. S. K.

NOVAJ LIBROJ

Bibliografio de internacia lingvo. Historia sistema katalogo de filologia, lingvistika kaj poliglota literaturo pri universala alfabeto, filozofia gramatiko, signaro, gest-lingvo, pasigrafio, internacia helpa lingvo kaj logistiko. Ellaboris kaj komentariis P. E. Stojan, licenciito en sciencoj. 1929, Eld. de Bibliografio Servo de UEA. 560 paĝoj 16×24 cm kun bildoj kaj grafikoj. Prezo sv. fr. 12.50 (Kč 80.—). Tiun ĉi grandiozan verkon ni recenzos en unu el la venontaj n-roj.

L. L. Zamenhof-Originala Verkaro. Kolektita kaj ordigita de D-ro Joh. Dieterle. Eld. de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. 605 paĝoj 14.5×22 cm, bindita. Prezo Rm 15.— (Kč 120.—). Vidu recenzon en tiu ĉi n-ro.

Belga Antologio. Eld. de Belga Esperanto-Instituto, Antverpeno, okaze de la XX. kongreso. En du volumoj: Flandra parto, kompilita kaj kun literatura resumo de H. Vermuyten 286 p.; Franca parto, de M. Jaumotte 286 p., 15.5×23.5 cm. Prezo ?? Ni recenzos.

Dudeka Universala Kongreso de Esperanto. Antwerpen 1928. Oficiala Dokumentaro Esperantista. Eld. de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, Genève. 140 p. 16×24.5 cm. Prezo sv. fr. 2.50 (Kč 20.)

SOUTĚŽ PROGRESA.

Výsledky naší soutěže o nejlepší překlad zajímavé krátké povídky českého autora hodláme uveřejnit v čísle dubnovém.

TRA LA GAZETARO.

Tuto rubriku obnovíme v čísle 2. a budeme v ní přinášeti přehledy všeho zajímavého, co najdeme v ostatních časopisech esperantských. Ev. upozornění od našich čtenářů budou nám vítána.

LINGVA FAKO

24. TEXT K PŘEKLADŮ.

Obnovujeme opět v tomto ročníku pravidelné uveřejňování textů k překladu, střídavě texty lehčí s těžšími. Překlady došlé do konce února prohlédneme a pojdíme podle nich poznámky jazykové. Nejlepší překlad odměníme pěknou knihou a i s poznámkami uveřejníme v následujícím čísle. Toto překládání těšilo se větší oblibě, než bylo viděti na počtu prací nám zasílaných. Mnozí čtenáři si totiž text přeložili, ale nám nezaslali, nýbrž počkali až na uveřejnění našeho překladu a pak si obě porovnali. Z toho ovšem měli prospěch jen oni sami. Celé obci čtenářské poslouží pouze ti, kdož nám svůj překlad zasílají a tím nám umožňují zjistiti, které věci jsou našim čtenářům nejasné, a dají nám tak možnost vysvětliti je v poznámkách.

Vlk a veverka. Skákala veverka s větve na větev a spadla zrovna na spícího vlka. Vlk vyskočil a chtěl ji sníst. Veverka dala se do prosení: „Dusť mne!“ Vlk povídal: „Dobře, pustím tě, povíš-li mi jen, proč jste vy veverky pořád tak vesely. Mně je vždycky tesknó, a kdykoli na vás vzhůru pohlédnu, vy si tam nahore stále hrajeťe a skáčeťe.“

Veverka řekla: „Dusť mě dřívě na strom, odťamtud ti to povím, ale tady se tebe bojím.“ Vlk ji pustil, veverka odběhla na strom a praviła odtud: „Tobě je proto smutno, že jsi zlý. Zlost ti srdce svírá. A my jsme vesely proto, že jsme dobré a níkomu zlého neděláme.“

JAZYKOVÉ DOTAZY A ODPOVĚDI.

Zveme naše čtenáře, aby se obraceli na nás ve všech případech, kdy potřebují vyjasnění některé části gramatické, překlad slova, rčení, obratu a p. Záslejte do této rubriky vše, co může prospěti ostatním čtenářům, zejména na př. zajímavá místa z četby nebo z Vašich překladů esperantských.


REDAKCIA.

La kelktaga malfruiĝo de la 1. n-ro estis kaŭzita per la neklara situacio de la decembra Bulteno, kiu ĝis hodiaŭ ne aperis.

La februara numero de La Progreso estas preskaŭ tute preparita kaj iras en la presejon en la unuaj tagoj de februaro.

Ne hezitu sendi la abonon por 1930. Ankaŭ tio ĝos la gazeton akurata. Dankon al tiuj kiuj jam pagis.

1. 2. 30.



Přáli jste si, ať
PROGRESO VYCHÁZÍ,
přáli jste si, ať
VYCHÁZÍ PRAVIDELNĚ.

*Jste a budete uspokojeni.
Usnadněte nám však vydávání.*

**ZAŠLETE PŘEDPLATNÉ
ZÍSKÁVEJTE PŘEDPLATITELE**

VYROVNEJTE SVOJE STARÉ ZÁVAZKY

Složenkou jsme přiložili k č. 10. resp. 1. Nemáte-li ji, pošlete 20 Kč bianco-složenkou (za 5 h na pošt. úřadě).

